

2019-07-19

## **Tria raporto de ILEI pri la 52-a Kongreso en Ĉaĉak, Serbio**

Laborgrupo kunsidis por esplori la eblojn por kreskigi la abonantaron de nia revuo *Juna Amiko*. Jam bona novaĵo estas, ke ĉiuj partoprenantoj de la Baltaj Esperanto-Tagoj ricevis po unu revuon kaj same okazos por la kongresanaro en Lahti. Plia bona novaĵo estas la preteco de Stefan MacGill analizi la nuntempajn abonojn kaj fari raporton precizan pri la nuna stato. La laborgrupo ne estas decidpova, sed verkos rekomendojn al la estraro kaj al la skipo de *Juna Amiko*, kiu konsistas el 12 regulaj kontribuantoj.

Marde vespere okazis solenaĵo por celebri la 70-jariĝon de la Ligo ILEI. Mireille Grosjean preparis 18 kvizojn, akrostikojn kaj alispecajn ludojn. Ŝi gvidis la vesperon preparante grupojn el kvar personoj: unu komencanto, unu lertulo kaj du mezuloj. Dum unu horo la grupoj arde diskutis inter si por solvi la enigmojn, kiuj rilatis al la vivo de la Ligo kaj al ĝeneralaj konoj. Neniu surpriziĝis, kiam la grupo de Stefan MacGill venkis. Mireille Grosjean faris donacojn al tri kongresanoj, kiuj naskiĝis en 1949, en la sama jaro kiel la Ligo. Do la vespero ne estis solena, sed gaja kaj lerniga.

Tuttaga ekskurso merkreda kondukis kvardekon da kongresanoj al apuda lando Bosnio, kie ni krozis dum 3 horoj sur belega lago inter klifoj, sovaĝa kaj profundega, tre impresa. Krozado ne nur ebligas abunde foti, sed ankaŭ abunde babilu kaj konatiĝi.

Dutaga Konferenco komenciĝis ĵaŭde matene. Pro la fakto, ke la Konferenco prezentas pli ol dek prelegojn, ĝi fariĝis integra parto de la programo de la Teknika Altlernejo, kie la Kongreso okazas. Proks. 15 studentoj kaj profesoroj de la universitato partoprenas la eventon, kiu okazas en feria periodo. Tiu partopreno alportas al la studentoj poentojn en ilia studenta kariero. Komence aŭdiĝis tri prelegoj de serbaj studentoj kun traduko al Esperanto. Post la unua prelego en Esperanto kun traduko al la serba, la loka publiko anoncis, ke la tradukado devas ĉesi: «Ni komprenas sufiĉe Esperanton!». Kaj tiel okazis. En la programo estis unuhora enkonduka kurso pri Esperanto por ili, tamen ili volis, ke ni metu tri horojn. Kaj tion ni faris.

Ĵaŭde vespere okazis la tradicia bankedo, kie tri muzikistoj ravis la esperantistan grupon. Jam antaŭ la manĝo kelkaj komencis danci. Bongustegaj pladoj ne mankis.

Kongresa Rezolucio pretas por aprobo.

Hodiaŭ estas la lasta tago de la Kongreso kaj la dua tago de la Konferenco. Altnivelaj kaj mondfamaj esperantistoj de la balkana regiono elstare mankas inter la kongresanaro.

Krom en la unua tago, kiam vespere mallonge pluvegis, la vetero en Serbio estas tre bela kaj la temperaturo kaj humideco tre agrablaj.

Raportas la prezidanto Mireille Grosjean